



# Kleriga Lundo

*Lundon, la 27-an de julio 2015*

| UNUA BLOKO: 10h15 - 11h45                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                  |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <span></span>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                              |
| <b>Eŭritmio</b>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                            |
| Tali Wandel                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                |
| Kiel eblas kultivi vivan aŭskultadon kaj komunikadon inter si mem, grupo da homoj, kaj la mondo samtempe? Tra prelego kaj fizika praktiko de la movo-arto eŭritmio, ni esploru kiel estado de la diversaj artoj kultivas la arton esti homo, kune, kaj la unika individuo kiu ĉiu el ni estas. Eŭritmio estas movo-arto kiu videbligas la paroladon kaj kantadon. Tali Wandel estas profesia eŭritmiistino.                                                                                                                |
| <i>10h15-11h45, Babin</i>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                  |
| <b>Kant-ateliero de Kajto</b>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                              |
| Kajto                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                      |
| <i>Kanono-farado estas nia hobio. Tiujn humurajn miniaturojn kanti ni ŝatas, kaj laŭte kaj softe. Kanono-fabrikado estas aliula profesio. Sed domaĝe ties sonas alimaniere ol la niaj, ankoraŭ ĉiam pli ofte. Ŝanĝu tion!</i>                                                                                                                                                                                                                                                                                              |
| Dum la UK, Kajto kvar-foje prizorgos kant-atelieron, en kiu la plej grava estas la kant-plezuro. Ĉiu estas bonvena por partopreni, ankaŭ tiuj, kiuj supozas, ke ili ne povas kanti. Sub la inspira gvido de Ankie & Nanne la partoprenantoj estos invitataj pasie kunkanti la gajajn, la melankoliajn, la komikajn, la profundsencajn kanonojn kaj refrenojn. Partoprenu 1, 2 aŭ 3 aŭ ĉiujn 4 fojojn en la kant-ateliero ‘Kajto Kun-Kant-Kanonado’, por helpi superbrui tiujn aliajn kanonojn, kaj finfine silentigi ilin. |
| <i>10h15-11h45, Lamas Díaz</i>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                             |
| <b>Grundtvig-partneraj projektoj: kion eblas lerni pri ili kaj el ili?</b>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                 |
| Francesco Maurelli, Sara Spanò kaj Edvige Tantin Ackermann, kun intervenoj de aliaj partoprenantoj                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                         |
| Kapablo, internacia kunagado, interkultura interŝanĝo: per partopreno en internacia edukadprojekto vi havas la ŝancon maturiĝi kaj kreski, kaj kiel personoj kaj kiel aktivuloj.                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                           |
| Venu koni la spertojn de reprezentantoj de organizo engaĝitaj en “Elloke tutmonden” kaj en “Volontulado kiel persona evoluo”, du partneraj Grundtvig-projektoj EU-subvenciitaj, kadre de kiuj Esperanto montriĝas kiel aldona valoro por kunkonstrui kaj plifirmigi internacian kunlaboradon.                                                                                                                                                                                                                              |
| Engaĝiĝu kun la partoprenantoj, konatiĝu kun la rezultoj de la projektoj, kaj pripensu ĉu ankaŭ via organizo volas havi similan sperton!                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                   |
| <i>10h15-11h45, Norvell</i>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                |
| <b>Prozo en Esperanto: ĉu ni havu minuskomplekson?</b>                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                     |
| Istvan Ertl. Podianoj: Gerrit Berveling, Nicola                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                            |

Ruggiero, Anina Stecay

Se ni kongresus ankaŭ ĉi-jare en Islando, mi certe lanĉus la demandon kial la sagaoj kaj krimromanoj de trionmiliona komunumo estas tutmonde aprezata, dum pri la beletro de nia lingvanaro (supozeble) pli granda apenaŭ iu scias. Nu, la demando eĉ sen/post Islando aktualas.

*10h15-11h45, Pauli*

**Merkatiko**

Dennis Keefe

Merkatiko troviĝas inter la plej nekonataj kaj miskonataj fakoj en Esperantujo. Tamen, la scienco kaj arto Merkatico povas esti unu el la plej utilaj fakoj por informi kaj varbi la eksteran publikon al la Esperanto-Movadoj. En ĉi tiu sesio vi lernos pri la partoj de Merkatico, kiuj povas servi al la Esperanto-Movadoj lokaj, landaj kaj internaciaj. Temoj inkluzivas: celgrupojn, varbadon, informadon, reklamadon, strategion, strategio-ĉenon, internacian merkaton, disvastiĝon de novaj ideoj kaj Esperanton.

*10h15-11h45, Berthelot*

DUA BLOKO: 12h00-13h30

**Aikido**

Christoph Klawe, Mireille Grosjean

Per karesoj konvinki la atakanton ne ataki. Jen AIKIDO, senperforta luktarto el Japanio. Vetkonkursoj estas malpermesitaj. AIKIDO ne aperas kadre de la olimpiaj ludoj. La praktikado de AIKIDO estas saniga por la korpo, kaj gvidas al memkono, memregado, memrespekto kaj harmoniaj kontaktoj kun la aliaj.

D-ro Christoph Klawe montros kelkajn praktikajn ekzercojn ne el la sindefenda parto de la arto, sed por sperti la bazan principon (tiel nomataj „Ki-ekzercoj“).

*12h00-13h30, Babin*

**Esperanta poezio en Universalaj Kongresoj: rigardo tra la jaroj**

Michela Lipari, Humphrey Tonkin

La centa Universala Kongreso estas bona okazo por konsideri la ligon inter poemoj kaj kongresoj – ekde la unua monda kongreso en Bulonjo kaj la Preĝo sub la Verda Standardo, kiun Zamenhof deklamis antaŭ la tiea kongresanaro. En tiu ĉi kunsido, Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari kondukos nin – kun helpo de spertaj legantoj – de kongreso al kongreso spurante la influon de la poezia arto.

*12h00-13h30, Berthelot*

**E@I - 10 jaroj da aktivado (ne nur) por Esperanto – defioj, atingoj, sukcesoj**

Kunordiganto de E@I – Peter Baláž

Dekjariĝo de E@I estas bona tempo por sumigi ties plej sukcesajn atingojn, kaj doni superrigardon pri la ĉiuspeca aktivado de la organizo. Skiza, tamen valora prezento de projektoj de E@I – ĉu retaj projektoj, ĉu aranĝoj aŭ eldonaĵoj. Venu ekscii kion E@I faris, faras kaj faros, kaj kion ĉion vi mem povas praktike utiligi kaj ev. eĉ kunlabori. Prezentitaj estos ĉefe projektoj lernu. net, lingvo.info, deutsch.info, slovake.eu, mluvtecesky.net, cyberhelp.eu, monda.eu, *www.komputeko.net*, *www.vortaro.net* (reta PIV), SES, KAEST, kaj ni mencias ankaŭ planojn por baldaŭaj projektoj.

*12h00-13h30 Norvell*

**“Pardonu min! Mi ne sciis.”**

**Kiel pardonpeti en Esperantujo?**

Kristin Tytgat

En Esperantujo ni kunlaboras kun la tuta mondo, foje sukcese, foje ne.

Ĉu ni kulpas se io malbone iras pro nesufiĉa kompreno de fremda kulturo?

Ĉu ni devas pardonpeti pro tiu manko kaj kiumaniere ni faru tion?

Venu al la interkultura sesio por esplori eblan konduton en tiklaj situacioj sen devi pardonpeti pro via nescio.

*12h00-13h30, Lamas Díaz*

**Ne trolu, trellu!**

Veronika Poór

Organizu vian interretan kunlaboron! Mi jam sukcesis, sukcesu ankaŭ vi!

Amaso da ideoj, projektoj, kaj vi perdiĝas inter la retmesaĝoj, celoj, projektoj? Kiel aliaj solvas tion?

Per Trello, per senpaga interreta mastrumsistemo, kiu jam helpas al multaj esperantistaj kaj ne-esperantistaj teamoj mastrumi siajn kunlaboron, projektojn. Aldone ni ankaŭ traktos kelkajn bazajn konceptojn de projektmastrumado. Dum la sesio ni uzos la ekzemplojn de la projektoj de la ĉeestantoj por vidi kiel Trello estas utiligebla. La sesion gvidos estrarano de TEJO, respondeca pri 4 fakoj kaj samtempe aktivulino en Muzaiko kaj aliaj retaj projektoj, Veronika Poór. La homoj prefere kunportu sian komputilon.

*12h00-13h30, Pauli*

TRIA BLOKO 13h45-15h15

**Memoroj pri la Japano Katastrofo en 2011**

Hori Jasuo

Montrante per projekciilo fotojn pri la cunamo, Hori Jasuo legos siajn poemojn.

Okazis grandaj tertremo, cunamo kaj la nuklea akcidento en Japanio en 2011. Poste li vizitis la damaĝitajn

regionojn pli ol 30 fojojn kaj fotis multe. Okaze de la 4-jariĝo de la katastrofo li eldonis libron “Memoroj pri la Japano Katastrofo”, kiu enhavas 160 kolorajn fotojn kun poemoj en la japana kaj Esperanto. Dum la kunsido li deklamos tiujn poemojn, montrante tiujn fotojn.

*13h45-15h15, Babin*

**Kerigaj ludoj en Kleriga Lundo**

Anna Montesinos de Gomis

Ĉu vi volas aldoni ion alian al viaj Esperanto-kursoj? Ĉu ni travojaĝos la mondon kune, malkovrante multon belan, interesan aŭ eble nur kuriozan pri ĝi? Ĉu ni sportumu sen ŝvito? Eble ĉu ni ion alian faros ankaŭ? Kial ne veni por ĝui la spertojn kun ni? Kaj tiel denove ĉi-jare ni havos okazon amuziĝi kaj espereble samtempe lerni ion novan kune.

*13h45-15h15, Lamas Díaz*

**Tradukado en multlingvaj medioj**

Istvan Ertl, Brian Moon

Ĉiu uzanto de Esperanto pli-malpli ofte konfrontiĝas kun problemoj de tradukado inter Esperanto kaj naciaj lingvoj. Por rigardi tiujn problemojn el iom speciala perspektivo, ni proponas konsideri la situacion en organizaĵoj, kiel Eŭropa Unio, kie ĉiutage uziĝas multaj lingvoj.

Sur bazo de praktika tradukado de specimena teksto jam ekzistanta en diversaj lingvoj, ni iom esploros la avantaĝojn kaj la problemojn de Esperanto en tiu ĉi kampo.

*13h45-15h15, Norvell*

**La arto publike paroli**

Humphrey Tonkin

Ekzistas granda diferenco inter tiuj, kiuj bone kaj persvade parolas publike, kaj tiuj, kiuj malsukcesas kapti kaj teni la atenton de siaj aŭskultantoj. Ĉu efikaj publikaj parolantoj naskiĝas au kreiĝas? Ĉu paroli publike en Esperanto estas malsama afero ol paroli publike en la gepatra lingvo? En tiu ĉi sesio ni lernos kiel plibonigi nian kapablon paroli antaŭ publiko, precipe Esperanto-publiko.

*13h45-15h15, Berthelot*

**Kunkreu elsendon por Muzaiko!**

Volontuloj de Muzaiko

Muzaiko (*www.muzaiko.info*) estas tuttempa tutmonda tutmojosa tutesperanta retradio-kanalo, kiu ludas por vi 24 horojn en diurno muzikon, programerojn, novaĵojn, informojn, raportojn, arkivaĵojn kaj multe pli! Ĉu vi havas ion por diri al la tuta mondo? Jen ebleco por vi tion fari. Dum la sesio jam spertaj kontribuantoj de Muzaiko helpos vin lerni kiel – de la registrado ĝis la alŝutado de la preta elsendo. Oni eĉ kreos veran elsendon, laŭtlegos tekstojn. Venu por spertiĝi kaj krei! Se eblas, kunportu al la sesio komputilon, kapaŭskultilon kaj registrilon.

*13h45-15h15, Pauli*